[4] En Hungara Scienca Akademio estas du akademiaj gradoj: "koresponda" kaj "orda".

[5] *Jean August* INGRES (1780-1867) elstara franca pentroartisto kaj grafikisto, kiu eminente kaj plezure ankaŭ violonludis (*Gábor* 1972).

[6] Protobulgaroj: batalema nomada popolo kun tjurka lingvo, kiuj, migrante de la rivero Volgo al la nordoriento de Balkanio, konkeris la tieajn grandnombrajn (sed ne unuiĝintajn) slavojn, kaj fondis la unuan "bulgaran imperion" (681 – 1018). Dume ili slaviĝis, sed ilian nomon konservis kaj la popolo kaj la lingvo kaj la lando (българи, български, България = bulgaroj, la bulgara, Bulgario).

Literaturo

Berend T. Iván 2003: *History derailed: Central and Eastern Eŭrope in the "long" 19th century* (Historio dereliĝinta: Meza kaj Orienta Eŭropo en la "longa" 19-a jarcento). *University of California Press, Berkeley.*

Budai Ésaiás 1802: *Régi tudós világ históriája* (Historio de la malnova scienca mondo). *Szigethy Mihály, Debrecen.*

European Commission, Staff of the, 2002: *Promoting Language Learning and Linguistic Diversity. Working paper. European Commission, Brussels, November* 13.

Gábor György 1972: *Ingres hegedűje* (La violono de *Ingres*). *Magvető, Budapest.*

Strabón 1977: *Geógraphika. Gondolat, Budapest.*

Adreso de la aŭtoro

Prof. Haszpra Ottó
Húr u. 9 A 111 Iph. 1/3
HU – 1223 B u d a p e s t
HUNGARIO

<othasz@gmail.com>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estis universitata profesoro kaj gvidanto de la Katedro pri hidraŭliko kaj hidroteknika konstruado kaj direktoro de la Instituto pri hidroteknika konstruado kaj akvomastrumado en la Budapeŝta Teknika kaj Ekonomika Universitato. Koresponda membro (1998 – 2004), poste orda membro (2004 –) de la Hungara Scienca Akademio.

Tombo,
Grab, grave, grob, sepolchro, tombeau, tumba:
Etimologiaj kaj semantikaj rimarkigoj pri la plurlingveco de Eŭropo

Wolfgang VIERECK

Enkonduko

Krom la motivaj mapoj (pri ties komprenoj kp. *Viereck* 2000) la eŭropa lingvoatlaso (*Atlas Linguarum Europae*) prezentas ankaŭ onomasiologiajn mapojn, en kiuj la esprimoj estas interpretataj kaj etimologie kaj semantike.

Antaŭ nelonge mi pritraktis la esprimon ‚laboristo' (*Viereck* 2004), kaj nun vortoj por ‚tombo' estas analizataj en kelkaj eŭropaj lingvoj. Estas respondoj al la demando: „*Quel est dans votre dialecte le nom du trou dans la terre où l'on met le mort*?" [Kio estas en via dialekto la vorto por la truo en la tero, en kiun oni metas la mortintojn?]

Tiuj vortoj estas tre malnovaj en la eŭropaj lingvoj. La unuaj formoj de entombigoj jam troviĝas en la paleolitiko.

1. Etimologiaj rimarkigoj

Tiuj dividiĝas en rimarkigoj pri hindeŭropaj kaj ne-hindeŭropaj lingvoj. Mi komencos per la unuaj, ĉar ili klare superregas en Eŭropo[1].

1.2. Hindeŭropaj lingvoj

La modernajn terminojn por tombo en tiuj lingvoj oni povas devenigi de jenaj ok radikoj.

1.2.1 Hindeŭrope **ghrebh-* ‚fosi', ‚grati', ‚skrapi' (*Pokorny* 1959, 455s.), ?**g^hreb^h-* ‚fosi' (*Rix & Kümmel* 2001, 201)

La esprimo por la truo en la tero, en kiun oni metas la mortintojn deriviĝas en la plej multaj eŭropaj lingvoj de tiu radiko. Ĝi evoluis en la ĝermanaj lingvoj al gote kaj malnov-altgermane *graben,* malnov-angle *grafan* kaj malnov-norde *grafa.* De tiuj verboj oni derivis substantivojn, nome malnov-altgermane *grap* > novaltgermane *Grab,*

malnov-angle *græf* > mez-angle *grave* (la dusilaba formo verŝajne devenas de la tre ofta troviĝo de tiu vorto en dativo [lokativo]) > nov-angle *grave*, malnov-norde *grof* > dane *grav*, svede *graf* kaj islande *gröf*, malnov-sakse, mez-basgermane, mez-nederlande *graf* > nuntempe nederlande *graf*.

Ĉe malnov-eklezio-slave *grebǫ* ‚fosi' kaj *grobъ*, tombo' oni povas vidi, ke la menciita radiko ankaŭ estas la bazo por la plej multaj slavaj lingvoj. Nuntempe *grob* troviĝas en la serba, kroata, slovena kaj bulgara, *grób* en la pola, *hrob* en la ĉeĥa kaj slovaka kaj *row* en la soraba. Slovenaj dialektoj krome havas la diminutivan formon *grobec* same kiel *grobišče, groblje* kaj *pogrob*, kiuj ĉiuj devenas de tiu radiko. Ruse *grob* nuntempe signifas ‚ĉerko', sed antaŭe ‚tombo' (*Pfeifer* 1999, 590). La demando estas kontestata, ĉu rumane *groapă* ‚tombo' estas parenca al la slavaj lingvoj, ekz. al bulgare *grob*. Kelkaj etimologoj supozas, ke *groapă* estas aŭtoĥtona, aliaj ĝin devenigas de albane *gropë*, ankaŭ en la signifo ‚tombo', ‚truo' (*Ciorănescu* 2002, 379). Ke *gropë* estas malnova vorto en la albana, tio evidentiĝas per la parenca verbo *gremonj* ‚fosi'. La terminoj por ‚tombo' en la romaa montras, ke la ciganaj lingvoj libere pruntas el siaj najbaraj lingvoj: *hrobos* estas pruntvorto el slovake *hrob, grabo* estas pruntvorto el germane *Grab, govr* estas pruntvorto el jide *kewuro* kaj *morminto* estas pruntvorto el rumane *mormânt* (*Wolf* 1960, 93, 102, 154).

1.2.2 Hindeŭrope **tuem* ‚ŝveli' (*Rix & Kümmel* 2001, 654)

Tiu radiko evoluis al malnov-greke (kaj nuntemp-greke) *τύμβος* ‚teraltaĵo', ‚tombaltaĵo' (*Hofman* 1950, 378 kaj *Frisk* 1973, 943s.) kaj al latine *tumēre* ‚volbiĝi', ‚ŝveli', kiu poste fariĝis *tumulus* ‚teraltaĵo', ‚tombaltaĵo'. Angle *tumulus* estas pruntvorto el la latina; ĝia signifo estas ‚malnova tombaltaĵo'. La postklasika eklezio-latina esprimo *tumba* ‚tombo' montras, ke tiu vorto estas malfrua pruntvorto el la greka kaj ne pluevoluigo el la menciitaj latinaj vortoj (*Walde* 1930-1956, 715). *Tumba* penetris en kelkajn latinidajn lingvojn, vidu france *tombe* kaj *tombeau*, itale, provence kaj katalune *tomba*, hispane, portugale kaj sarde *tumba*, ĉiukaze en la signifo ‚tombo' (*Dee* 1997, 536). Ankaŭ en Esperanto troviĝas *tombo*. *Löpelmann* (1968, 1314) prezentas *tonba* kaj *tunba* ‚tombo' en la vaska; tiuj estas pruntvortoj el la najbaraj romanidaj lingvoj. La angla esprimo *tomb* – kun la malnoviĝintaj skribmanieroj *tumb* kaj *tumbe* – ‚tombo' estas pruntvorto el malnov-france *tombe*. La *–b* ĉe vortfino

sensoniĝis en la angla komence de la frua 14a jarcento, sed la skribmaniero restis kaj estas la akceptita formo ekde la 17a jarcento. *Tumba* ankaŭ pruntiĝis al la germana, kie ĝi signifas ‚sarkofagmaniera superkonstruaĵo por tombo kun tombslabo'.

1.2.3 Hindeŭrope *bhedh-* ‚piki en la teron, fosi' (*Pokorny* 1959, 113s.), $*b^h ed^h h_2$- ‚piki en la teron, fosi' (*Rix & Kümmel* 2001, 66)

En la latina tiu radiko evoluis al *fodere, fōd(ī)-* ‚fosi', *fodicāre* ‚ripete piki en la teron' kaj *fossa* ‚fosaĵo' ‚tertruo'. *Fossa* en la signifo ‚tombo' nuntempe troviĝas en la kataluna kaj romanĉa.

Bretone *béz*, kimre *bedd* kaj kornvale *bedh* montras, ke ankaŭ tri keltaj lingvoj havas vortojn por ‚tombo' el tiu radiko. La evoluo okazis per gaŭle *bedo-* ‚fosaĵo'.

Parencaj formoj troviĝas en hitite *paddai* ‚fosas', malnov-eklezio-slave *bodǫ* ‚piki', litove *bedù* ‚piki', ‚fosi'; gote *badi* ‚lito', malnov-altgermane *betti* ‚lito' > nuntemp-germane *Bett* kaj – ekde la 17a jarcento – *Beet* ‚ĝardenbedo' kaj malnov-angle *bed(d)* > nuntemp-angle *bed* ‚lito' kaj ‚ĝardenbedo'. „La primitiva ideo ‚elfosita loko' estis tute malaperinta en la ĝermana, kie la vorto havis nur du signifojn, nome ‚porhoma dormejo' kaj ‚ĝardenbedo'. Estas malcerte, ĉu la lasta signifo sendepende venis de la baza ideo ‚fosi' aŭ ĉu temas pri transigo de lito por dormi rilate al ĝia formo aŭ ĝia celo" (*OED* 1989, sub gvidvorto ‚bed', substantivo; tradukita el la angla).

1.2.4 Hindeŭrope **sep-* ‚okupiĝi pri io', ‚honori iun/ion' (*Pokorny* 1959, 909), ‚zorgi pri', ‚honori' (*Rix & Kümmel* 2001, 534), ‚celi ion kun sincera simpatio' (*Walde* 1930-1956, 487).

El tiu radiko kaj ties pligrandigo **sep-el* ‚respekto', ‚zorgo' evoluis latine *sepelīre* ‚enterigi', ‚entombigi' aŭ ‚forbruligi', kio aliflanke formiĝis al *sepultura* ‚entombigo', ankaŭ ‚forbruligo', kaj *sepulcrum* ‚tombo', ‚tombaltaĵo'. Modernaj reflektoj de tiuj vortoj troviĝas en preskaŭ ĉiuj latinidaj lingvoj, vidu katalune *sepultura* aŭ *sepulcre* (*Carominas* 1954, 28), portugale *sepultura* aŭ *sepulcro* (*Machado* 1977, 1982), itale *sepoltura* aŭ *sepolcro*, hispane *sepultura* aŭ *sepulcro* kaj france *sépulture* aŭ *sépulcre*. Angle *sepulchre* ‚tombo' aŭ ‚entombiga loko' kaj *sepulture* ‚enterigo, entombigo', ‚entombiga loko, tombo' estas pruntvortoj el la malnov-franca.

Ekzistas interligo al sanskrite *sápati* ‚zorgas' kaj malnov-perse *hapariya-* ‚doni respekton'.

1.2.5 Hindeŭrope **(s)kep-, *(s)kop-* aŭ **(s)kap-* ‚per akra ilo tranĉi', ‚fendi' (*Pokorny* 1959, 930ss.), **(s)kep-* ‚haki', ‚tranĉi' (*Rix & Kümmel* 2001, 555)

Tiukaze temas pri tielnomata movebla *s*. Kiam hindeŭropa komenca *s* estis la unua elemento de konsonantogrupo, tiam ĝi estis nestabile sono, kiu povas perdiĝi sub ne tute klarigitaj kondiĉoj.

Malnov-pruse *enkopts* ‚enterigi', litove *kãpas* kaj latve *kaps*, ambaŭ en la signifo ‚tombo(-altaĵo)', venas de tiu radiko. Kp. greke *(σ)κάπε-τος* ‚fosaĵo', ‚tombo' kaj malnov-eklezio-slave *kopajǫ, kopati* ‚fosi' (*Fraenkel* 1962-1965, 217). Ankaŭ pole *kapi* ‚preĝeja korto' aŭ ruse *kopa* ‚amaso, stako' estas menciendaj interlige kun tio.

1.2.6 Hindeŭrope **uer-* ‚fermi, kovri, gardi, savi' (*Pokorny* 1959, 1160s.), ‚protekti', ‚savi' (*Rix & Kümmel* 2001, 684s.)

La albana verbdevena substantivo *varr/vorr* ‚tombo' evoluis el tiu radiko (**uornā*). *Varr* estas la suda aŭ toska dialektovarianto, sed *vorr* estas la norda aŭ gega formo. Ekzistas ligiteco kun albane *vathë* ‚ĉirkaŭbarado' kaj verŝajne ankaŭ kun albane *birë* ‚truo' kaj *groverë* ‚kavo' (*Meyer* 1982, 37).

El tiu radiko interalie evoluis mez-irlande *fert* ‚tombaltaĵo (fermita per ŝtonoj)' > nuntemp-irlande *fert* ‚tombo(-altaĵo)', gote *warjan*, malnov-norde *verja*, malnov-angle *werian* > nuntemp-angle *to ware*, skote kaj dialekte ‚elspezi, pasigi' (la malnov-anglaj signifoj ‚gardi', ‚defendi'; ‚embarasi' ne transiris al la mez-angla) kaj malnov-altgermane *werian* > nuntemp-germane *wehren* ‚defendi', ‚gardi'.

1.2.7 Hindeŭrope **men-* ‚pensi, esti mense ekscitita' (*Pokorny* 1959, 726ss. kaj *Rix & Kümmel* 2001, 435s.)

Tiu radiko evoluis al greke *μέμονά* ‚deziri, memori', oske *memnim* ‚monumento' kaj ankaŭ latine *meminī* ‚memori' kaj *monumentum/monimentum* ‚monumento', ‚io memoriganta', ‚tombo'. Rumane *mormânt* [2] kaj cigan-lingve *morminto*, kiuj ambaŭ signifas ‚tombo', deriviĝas de la laste menciita vorto (*Meyer-Lübke* 1972, 465, *Cihac* 1978, 170 kaj *Wolf* 1960, 154). Latine *monumentum/monimentum* venis ankaŭ en la kimran, kp. *mynwent* ‚tombejo', kaj en la anglan. La unua registrita signifo de *monument* en la angla, nun malnoviĝinta estis ‚tombo, tomba loko'. *OED* registras la vorton unue 1300 en tiu signifo kaj 1658 laste. La signifo ‚konstruo el ŝtonoj aŭ el alia solida materialo, por memoro pri la mortintoj, aŭ super tombo aŭ en parto de konsekrita konstruaĵo' aperas en la angla nur multe pli poste, laŭ

OED nur en la malfrua 16a jarcento (*OED* 1989, sub gvidvorto ‚monument', substantivo 1 kaj 5b).

Parencaj esprimoj ekzistas en kelkaj hindeŭropaj lingvoj, kiel sanskrite *manyate* ‚pensas' kaj *mánas-* ‚signifo', armene *i-manam* ‚kompreni', malnov-irlande *do-moiniur* ‚kredi, signifi', litove *menù* ‚memori' kaj *manyti* ‚kompreni', latve *minêt* ‚memori' kaj malnov-eklezio-slave *po-mъněti* ‚memori'.

1.2.8 Hindeŭrope **mogh-* ‚granda, forta, peza' (*Wade* 1999, 123)

Laŭ *Wade* ekzistas konekto de tiu hindeŭropa radiko al nuntempruse *mogila* ‚tombo', nome per malnov-eklezio-slave *mogati* ‚esti kapabla'. Sed li ankaŭ mencias alternativojn kaj aludas eblajn konektojn al arabe *maghárah* ‚kavo', albane *gamulë* (kun g-m/m-g metatezo) ‚altaĵoj de diversaj specoj' kaj rumane *măgură* ‚altaĵo'.

Aliflanke *Vasmer* (1950-1959, 144) ordigas la malnov-rusan vorton *mogyla* ‚tombaltaĵo' al malnov-eklezio-slave *mogyla* ‚altaĵo', bulgare *mogila* ‚altaĵo', serbe kaj kroate *gòmila* aŭ *mògila* ‚teramaso', slovene *gomila* ‚teramaso', ĉeĥe kaj slovake *mohyla* ‚teramaso', ‚tombaltaĵo' kaj pole *mogila* ‚tombo, tombaltaĵo'. Nuntempe *mogila* estas malnoviĝinta en Slovenio. La origina signifo de ĉiuj tiuj vortoj estis ‚altaĵo'. Al tiuj nomitaj vortoj apartenas – kiel verŝajne slavaj pruntvortoj – rumane *măgură* (jam pli supre menciite) kaj albane *gamulë* kaj ankaŭ *magulë* ‚altaĵo, malgranda altaĵo' – la lasta estas en Grekio uzita formo de la albana. Krome *mogila* estas dokumentita nuntempe ne nur en la rusa (kiel jam menciite), ukraina kaj belorusa, sed ankaŭ en la urala komi-permjaka lingvo, kie oni devas rigardi ĝin kiel pruntvorton el la rusa.

1.2.9 Irlande kaj skot-gaele *waigh*

Nuntemp-irlande kaj skot-gaele *waigh* ‚tombo' devenas de malnov-irlande *uag*, kio samsignifas. Ankaŭ *uad* ekzistas, sed nur kiel mez-irlanda skribduoblaĵo de *uag*. Kelkaj etimologoj rigardas ĝin kiel malnovan vorton por ‚okulo'. En kelkaj lingvoj ‚okulo' signifas truon, malfermaĵon, kiel en malnov-irlande *derc* (> nuntemp-irlande *dearc*), greke *ὀπή*, gote *augo-dauro* ‚fenestro', malnov-norde *vindauga* ‚ventookulo' = ‚fenestro', mez-angle *windoge* (forpuŝis malnov-angle *ēagÞyrel* ‚okulmalfermaĵo', *ēagduru* ‚okulpordo'), sanskrite *gṛhāksa-* ‚fenestro' (laŭvorte ‚okulo de domo'). Sed tiu hipotezo restas duba, ĉar jam gote *augo* estas klarigebla diversmaniere (*Vendryes* 1978, U-2).

1.3 Ne-hindeŭropaj lingvoj

Ne-hindeŭropaj lingvoj jam kelkfoje estis menciitaj kiam temis pri pruntvortoj.

1.3.1 La vaska

Krom la romanidaj pruntaĵoj *tonba* kaj *tunba* ‚tombo' la vaska havas la vortojn *hilobi* ‚tombo', ‚tomba loko' kaj *hilarri* ‚tombo'. Ambaŭ substantivoj deriviĝas de *hil*, kiu signifas kiel verbo ‚mortigi, murdi' kaj kiel adjektivo ‚morta, paca, trankvila' (*Kühnel* 1999, 33). *–obi* estas sufikso, kaj *harri* signifas ‚ŝtono'.

Laŭ *Löpelmann* (1968, 518s.) la origino de *hil* estas en la egea kaj per ibera perado ĝi atingis la vaskan. Por pruvo oni mencias la similecon de ibere *ildu* al vaske *il du* ‚li mortigis lin'. Plue ekzistas ligitecoj al etruske *hil* aŭ *il* ‚mortigi, oferi' kaj al hebree *hilel* ‚trabori, vundi'.

1.3.2 Finno-ugraj lingvoj:

1.3.2.1 La finna kaj la estona

En la finna ekzistas nur unu vorto por ‚tombo', nome *hauta*. Laŭ la plej nova finna etimologia vortaro (*Kulonen* 1992, 148) *hauta* havas ekvivalentojn en ĉiuj finnaj lingvoj: ingre *hauta*, vepse *haud, houd*, karele *hauda*, vote *auta*, estone *haud* kaj livone *õda*. Por *hauta* ankaŭ ekzistas ekvivalento en la lapona: norvege-lapone *haw'de*, verŝajne finna pruntaĵo, kaj svede-lapone *saude* ‚gudrokavo'. ‚Gudrokavo' estas finne *tervahauta*, kio signifas ‚gudrotombo'.

Hauta eble estas pruntvorto el proto-ĝermane **sauÞa* > proto-finne **savta* ‚tombo' (*Koivuletho* 1976). Proto-ĝermane **sauÞa* evoluis al malnov-angle *sēaÞ* ‚kavo, tombo'; ‚profunda kavo' > nuntemp-angle *seath* ‚(profunda) kavo, truo, lageto', nun malnoviĝinta. Kiel finne *hauta* ankaŭ estone *haud* troviĝas ĉe ĉiuj retpunktoj de la eŭropa lingvoatlaso. Kiel duaj respondoj ekzistas kelkaj kunmetaĵoj en la estona, ekz. *surnuhaud, surnehaud* < *surnu* ‚morta, mortinto', propradire perfekto-participo de la verbo *surra* ‚morti', kio havas finno-ugran originon + *haud*, kaj *kooljahaud, kooluhaud* < *koolja* ‚mortinto', verbdevena substantivo de la verbo *koolda* ‚morti', kiu havas uralan originon, plus *haud*.

1.3.2.2 La hungara

En la hungara la vorto por ‚tombo' estas *sír*, kies etimologio estas nekonata. Tamen oni provas ligi la vorton *sír* kun la finno-ugra periodo kaj deklari ĝin heredita de tiu baza lingvo. Sed ĉe tio ekzistas etimologiaj kaj fonetikaj malfacilaĵoj. *Sír* estis unue menciita en la jaro 1055 kun la sama signifo, kiun la vorto havas nuntempe, nome ‚tombo, tombaltaĵo'. Plie ekzistas du kunmetaĵoj kun tiu vorto: *sírgődőr* (*Benkő* 1993-1997, 472 kaj 1332), ĉe kio *gődőr* signifas ‚valo', ‚malaltaĵo' (unua mencio 1251), ‚granda truo' (1566), ‚tombo' (1777), kaj *sírhalom*, ĉe kio *halom* signifas ‚malgranda monteto' (1055) kaj ekde la 16a jarcento ‚stako, amaso'.

1.3.3 La semida / malta

‚Tombo' estas malte *qabar*, kio venas de arabe *qabr* ‚tombo'. Tio estas verbdevena substantivo, kiu deriviĝas de la verbo *qabara* ‚enterigi'. Ŝajnas ke en la estinteco ankaŭ la romanida/itala vorto *tomba* estis uzata en limigitaj rondoj. Ĝi ankoraŭ troviĝas en la loknomo *It-Tomba* en Victoria, Gozo. Oni ligas la loknomon kun placo, ĉe kiu iam estis mezepoka tombejo.

1.3.4 Altajaj lingvoj, precipe la turka

Ekzistas vico da vortoj kun la signifo ‚tombo' en la malnov-otomana, en la turka literaturlingvo kaj ankaŭ en la turkaj dialektoj. Al la malnov-otomanaj vortoj apartenas *delik* < *delük* ‚truo', *eşin* < *eş* ‚fosi', *kara ev:* laŭvorte ‚nigra domo', *karaŋu*: laŭvorte ‚mallumo', *kör* < pruntvorto el perse *gūr* ‚tombo', *sin* < origine pruntvorto el ĉine *ts'in* ‚interna ĉambro de praulo-halo', ‚tombloko, tombo' kaj *yėr ḳarnı:* laŭvorte ‚tervolbiĝo' (*yėr* ‚tero' + *karın* ‚volbiĝo' + *ı* = posesiv-finaĵo de la tria persono de singularo).

Esprimoj por ‚tombo' en la turka literaturlingvo estas jenaj: *mezar* < arabe *mazar* ‚pilgrimloko', ‚sankta placo' < arabe *zāra* ‚viziti' kaj *meşhet* ‚martirtombo' < arabe *maṣhad*. En turkaj dialektoj jenaj vortoj por ‚tombo' estas dokumentitaj: *gömgen* < turke *göm-* ‚enterigi' + *gen*, kiu estas malofta vortformiga elemento, *görün* < pruntvorto el perse *gūr* ‚tombo' + neidentigebla dua elemento, *ḳara yėr*: laŭvorte ‚nigra tero' (*ḳara* ‚nigra' kaj *yėr* ‚tero'), *sin* < malnov-turke *sin*, kiu – kiel jam dirite – estas pruntvorto el ĉine *ts'in* ‚interna ĉambro de praulo-halo', ‚tombloko, tombo', *teşik* < *teşük* ‚truo' kaj *yağız yėr*: laŭvorte ‚malhele bruna tero' (*yağız* ‚malhela, malhele bruna' kaj *yėr* ‚tero').

2. Semantikaj rimarkigoj

En la plej multaj hindeŭropaj lingvoj – kaj transe de tiuj – la substantivoj deriviĝas de verbo, ĉar la esprimo por ‚tombo' venas de la okupo, kiu estis necesa por elfosi tombon. Ĉiuj ĝermanaj lingvoj

apartenas al tiu grupo. Kaj eĉ en la slavaj lingvoj – krom malmultaj esceptoj – ĉiuj tiaj esprimoj venas de la sama radiko (kp. 1.2.1). Sammaniere ĉiuj vortoj, kiuj deriviĝas de **bhedh-/ *b^{h}ed^{h}h$_2$-* kaj **(s)kep-* apartenas al tiu grupo (kp. 1.2.3 kaj 1.2.5).

La fosado-procedo en unu aŭ alia maniero estas la bazo de la vorto. Oni povas diri sufiĉe certe, ke en la respektivaj landoj la mortinto estis metita en tertruon, kiu antaŭe estis elfosita. Cetere la anglo-saksoj fosis sufiĉe profundan rektangulan tombon, kiu ofte havis grandajn dimensiojn.

Ankaŭ en aliaj lingvoj ekzistas verbdevenaj substantivoj, en kiuj tamen ne estas esprimita la fos-agado. Ĉe la radiko **tuem-* oni ne komprenu la originan verbon laŭvorte, ĉar tiukaze nenio vere volbiĝas (kp. 1.2.2). Pli ĝuste oni devas supozi, ke la bazo de tiu radiko estis montetaj tomboj, kiuj aspektas kiel volbiĝo sur la kampoj. Kontraste ekz. al **ghrebh-/?*g^{h}reb^h-* (kp. 1.2.1) ne unue truo estis fosita, sed la mortinto estis kovrita per tero, el kio rezultis monteto, kiu aspektis kiel volbiĝo. La saman oni povas diri pri la radiko de ruse *mogila*, se oni sekvas la interpretadon de *Vasmer* (kp. 1.2.8). Ankaŭ albane *gamulë* aŭ *magulë* apartenas al tio.

Ankaŭ substantivoj, kiuj devenas de la radikoj **sep-*, **uer-* kaj **men-*, deriviĝas de verboj (kp. 1.2.4, 1.2.6 kaj 1.2.7). Sed ĉe tiuj esprimiĝas agadoj kaj sentoj, kiuj priskribas kiel oni traktu mortintojn, nome ke oni honoru, kovru, protektu kaj memoru ilin.

Se oni sekvas la opinion de *Wade* (1999) kaj ligas la rusan vorton *mogila*, kiu estas dokumentita ankaŭ en aliaj slavaj lingvoj, al la radiko **mogh-*, tiam tio estus escepto ene de la hindeŭropa lingvofamilio, ĉar tiam tiu esprimo estus derivenda de adjektivo kaj ne de verbo (kp. 1.2.8).

Laŭ *Wade* la bazo de la ligiteco inter tombo kaj la adjektivoj ‚granda, forta, peza' estas la priskribo de tombo aŭ kiel dominanta loko aŭ kiel placo, kie estis enterigitaj la fortaj potencaj homoj, la slava elito.

Ankaŭ en la malta, turka kaj vaska lingvoj verbdevenaj substantivoj estas dokumentitaj. Estas rimarkinde, ke nur en la vaska la signifo de la verba radiko estas ligita al morto (kp. 1.3.1). Tiurilate la vaska klare distingiĝas disde ĉiuj aliaj menciitaj lingvoj, en kiuj – ĉe la vorto por tombo – la morto ne ludas rolon.

Notoj

[1] Mi dankas al *Enver Hysa, Jenő Kiss, Vilja Oja, Sirkka Saarinen, Jožika Škofic, Semih Tezcan, Andreas Wagener, Joe Watson* kaj *Joe Zammit Ciantar* por ilia afabla helpo.

[2] En Rumanio superregis malsamaj ortografiaj konvencioj je malsamaj tempoj: Antaŭ la dua mondmilito la vorto estis skribita *mormânt*, dum la dua duono de la 20a jarcento *mormînt* kaj hodiaŭ denove *mormânt* (mi dankas al *Nicolae Saramandu* por tiu ĉi informo).

Bibliografio

Benkő, Loránd. Etymologisches Wörterbuch des Ungarischen. Budapest: Akadémiai Kiadó, 1993-1997.

Cihac, Alexandre de. Dictionnaire d'étymologie daco-romane. Osnabrück: Biblio Verlag, 1978 [1879].

Ciorănescu, Alexandru. Dicționarul Etimologic al Limbii Române. București: Saeculum, 2002.

Corominas, Joan. Diccionario crítico etimológico de la lengua castellana. Bern: Francke, 1954.

Dee, James H. Lexicon of Latin Derivatives in Italian, Spanish, French and English: A Synoptic Etymological Thesaurus with Full Indices of Each Language. 2 volumoj (*Alpha-Omega Reihe A*, 190/1, 190/2). *Hildesheim: Olms-Weidmann*, 1997.

Fraenkel, Ernst. Litauisches etymologisches Wörterbuch. 2 volumoj. *Heidelberg: Winter & Göttingen: Vandenhoeck & Ruprecht*, 1962-1965.

Frisk, Hjalmar. Griechisches etymologisches Wörterbuch (Indogermanische Bibliothek. Zweite Reihe: Wörterbücher). Heidelberg: Winter, 1954-1973.

Hofmann, J. B. Etymologisches Wörterbuch des Griechischen. München: Oldenburg, 1950.

Koivulehto, Jorma. "Vanhimmista germaanisista lainakosketuksista ja niiden ikäämisestä", Virittäjä: Kotikielen seuran aikakauslehti, 1976, 33-47.

Kühnel, Helmut. Wörterbuch des Baskischen. Wiesbaden: Reichert, 1999.

Kulonen, Ulla-Maija. Suomen sanojen alkuperä: etymologinen sanakirja. Volumo 1: *A-K. Helsinki: Suomalaisen Kirjallisuuden Seura*, 1992.

Löpelmann, Martin. Etymologisches Wörterbuch der baskischen Sprache. Dialekte von Lebourd bis Nieder-Navarra und La Soule. Berlin: Mouton de Gruyter, 1968.

Machado, José Pedro. Dicionário etimológico da lingua portuguesa. Lisbon: Livros Horizonte, 1977.

Meyer, Gustav. Etymologisches Wörterbuch der albanesischen Sprache. Straßburg 1891. *Nachdruck Leipzig: Zentralantiquariat der DDR*, 1982.

Meyer-Lübke, Wilhelm. Romanisches etymologisches Wörterbuch. Nachdruck der vollständig überarbeiteten 3. Auflage, 1935. *Heidelberg: Winter*, 1972.

OED = The Oxford English Dictionary, 2. *Aufl. vorbereitet von J.A. Simpson & E.S.C. Weiner. Oxford: Clarendon Press*, 1989. 20 volumoj.

Pfeifer, Wolfgang. Etymologisches Wörterbuch des Deutschen, 3. *ungekürzte Auflage. München: Deutscher Taschenbuch Verlag*, 1999.

Pokorny, Julius. Indogermanisches etymologisches Wörterbuch. Bern: Francke, 1959, 1969.

Rix, Helmut & Martin Kümmel. Lexikon der indogermanischen Verben. Die Wurzeln und ihre Primärstammbildungen, 2. *erweiterte und verbesserte Auflage. Wiesbaden: Reichert*, 2001.

Vasmer, Max. Russisches etymologisches Wörterbuch. Heidelberg: Winter, 1950-1959.

Vendryes, J. Lexique Etymologique de l'Irlandais Ancien. TU. Dublin: Dublin Institute for Advanced Studies kaj Paris: Centre National de la Recherche Scientifique, 1978.

Viereck, Wolfgang. Pri la kulturhistorio de Eŭropo / *Zur Kulturgeschichte Europas. Acta Sanmarinensia Academiae Internationalis Scientiarum*, vol. 5, n-ro 3, 2000.

Viereck, Wolfgang. Laboristo, *Arbeiter, ouvrier, workman, rabočij, obrero, operaio* – etimologiaj kaj semantikaj rimarkigoj pri la plurlingveco de Eŭropo, Scienca Revuo 55, 2004, 163-178.

Wade, Terence. Russian Etymological Dictionary. Bristol: Bristol Classical Press, 1999.

Walde, Alois. Lateinisches etymologisches Wörterbuch, 3. *Auflage, herausgegeben von Johann B. Hofmann (Indogermanische Bibliothek. Zweite Reihe: Wörterbücher). Heidelberg: Winter*, 1930-1956.

Wolf, Siegmund A. Großes Wörterbuch der Zigeunersprache (romani tšiw): Wortschatz deutscher und anderer europäischer Zigeunerdialekte. Mannheim: Bibliographisches Institut, 1960.

Adreso de la aŭtoro

Prof. Dr. Dr.h.c.mult. W. VIERECK
Obere Dorotheenstr. 5a
DE – 96049 B a m b e r g
GERMANIO

<wolfgang.viereck@split.uni-bamberg.de>

Priaŭtora informo

La aŭtoro estas emerita profesoro por anglaj filologio kaj mezepoka literaturo ĉe *Bamberg*-Universitato, Germanio. Li instruis ĉe Universitato de *Graz* (Aŭstrio) kiel plenranga profesoro kaj ĉe universitatoj de Israelo, Hungario, Pollando, Estonio, Ukrainio kaj Japanio kiel gastprofesoro.

Tradicioj de Moliero en la komedio de *Dancourt** "Somero de Koketulinoj"

MURSALIJEVA Ljudmila

Enkonduko

Ĉe la limo de la XVII/XVIII-a jarcento la verkaro de la franca komedi-verkisto Moliero (1622-1673) restas modelo por multaj dramverkistoj. Oni studis verki laŭ liaj komedioj, "...oni legis lin, studis lian poetikon; oni serĉis modelojn ne en la verkoj de Horacio, Aristotelo, *D'Aubignac*; nur Moliero estis modelo".[1]

Moliero estis granda reformanto de la franca komedio kaj li donis tre fortan impulson al ĝia evoluo. En lia verkaro troviĝas la fontoj, kiuj determinis daŭran evoluon kaj diversecon de la franca teatro. Multaj komediverkistoj volonte uzis temojn de molieraj komedioj, liajn situaciojn kaj personojn.

La plej lertaj talentuloj inter ili kree prilaboris la tradicion de Moliero kaj aldonis al siaj verkoj novajn aktualajn temojn kaj epokajn problemojn. Kune kun nova temaro aperis novaj komediecaj tipoj, kiujn la komedioj de Moliero ne konis: ruiniĝintaj aristokratoj, vivantaj je konto de virinoj ("bonŝanculo" *Baron* en la verko de *Dancourt* "Laŭmoda kavaliro"); virinoj-aventuristinoj, kiuj strebas allogi kaj ĉarmi virojn – tiujn, kiuj povus esti utilaj por ili ("Altnivelaj burĝinoj" de *Dancourt*).

Multaj tiuepokaj komedioj respegulas la pasion de hazardludoj en diversaj sociaj tavoloj ("Hazardludanto" de *Regnard*, "Kavaliro-hazardludanto" de *Dufresny* kaj aliaj).

Oni povas observi, ke en tiu periodo la komedia ĝenro evoluas de la **komedio de karakteroj** al la **komedio de moroj**.

---

* vera nomo: *Florent Carton*, franca dramverkisto kaj aktoro, vivis 1661-1725, kiel esperantigita nomformo plej konvena: Dankuro